

NOVEMBRO 2011

På grund av tekniska
problem har tidning
blivit försenad!

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2011:5-6

Information om Esperanto Informado pri Esperanto



Språkdag i Europahuset Lingva tago en Eŭropa domo

Ungefär 400 högstadie- och gymnasieelever besökte årets upplaga av Europeiska språkdagen, som i likhet med förra året firades i form av ett språkcafé i Europahuset i Stockholm.

Ĉirkaŭ 400 mezlernejanoj kaj gimnazianoj vizitis la ĉi-jaran Eŭropan lingvotagon, kiu same kiel la pasintan jaron okazis kiel lingva kafejo en Eŭropa domo en Stokholmo.

Foto: Olof Pettersson

Information på Skolforum Informado en Lerneja foiro

Även på Skolforum i Älvsjö 31 oktober – 2 november informerades det om esperanto. På bilden (också från Europahuset) Olof Pettersson och Fanny Tjäder.

Ankaŭ en Lerneja foiro en Älvsjö la 31-an de Oktobro – 2-a de Novembro oni informis pri Esperanto. Sur la bildo (ankaŭ de Eŭropa domo) Olof Pettersson kaj Fanny Tjäder.

Foto: Roland Lindblom



LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Novembro 2011 • 99-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: laespero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Pingvinpress

Prenumeration 2012: 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

tel. 08-34 08 00

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Plusgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2010:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggssexemplar kostar 100 kr/år).

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund,

Kågevågen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel 0910-733810

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

Plusgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com Telefon: 070-5850054

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Bellmansgatan 42, 2 tr,
754 26 UPPSALA, tel. 018-24 43 01

e-post: laespero@esperanto.se

Stoppdatum Utkommer senast

Nr 1 15 januari 15 februari

Nr 2 28 februari 30 mars

Nr 3 30 april 31 maj


Nr 4 15 augusti 15 september

Nr 5-6 31 oktober 30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Micke Englund



Kie vi naskiĝis?

Mi naskiĝis en Örebro, Svedio.

Kie vi loĝas?

Nuntempe mi loĝas en centra Stokholmo.

Pri kio vi laboras?

Mi posedas du vendejojn en kiuj mi vendas malnovajn diskojn – KDojn kaj vinilojn, raraĵojn kaj ĉiu-tagan materialon.

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?

La nuraj kromaj interesoj estas rilataj al muziko. Ne estas spaco por io alia.

Ĉu vi havas familion?

Familion mi eĉ ne estas proksima al havi.

De kiam vi interesigās pri Esperanto?

Mi interesigās pri Esperanto en la jaro 1982.

Ĉu vi havas aŭ havis iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Taskojn en Esperantujo mi ne havas ek de antaŭ dudek jaroj.

Kiu estas via preferata libro aŭ kulturaĵo en Esperanto?

Preferata kulturaĵo en Esperanto, do...Marcella Fasani estis/ estas belkonstruita kantistino.

Ĉu ekzistas iuj aliaj interesaĵoj pri vi?

Mi en jaro 2010 ludis kelkajn kantojn kun Kim Henriksen – Danio dum IJF en Italio. Estis la unua fojo en dek jaroj por mi kiel muzikisto en Esperantujo. Mi ne planas plenan revenon.

Intervjuis: Leif Nordenstorm

VORTOJ DE LA REDAKTORO


Mi jam estis redaktoro de La Espero dum pli ol dek jaroj. Ĉu eble dum preskaŭ dek kvin. Mi ne kalkulis. Neniam estis problemo plenigi numeron per materialo. Ĉiam alvenas multe da raportoj, fotoj, noticoj, petoj pri kion skribi en la revuo.

Tio ĉi atestas pri tio ke multo okazas en Esperantio. Estas multa aktiveco. Eble ni ne ĉiam konscias pri tio.

Mem serĉu materialon en Esperanto en interreto. Guglu kelkajn esperantajn vortojn kaj vi trovos ke aperas multege da materialo pri Esperanto ankaŭ en la reto. Bonan sukceson!

Via redaktoro

ESPERANTO DIREKT Ny lärobok på svenska



114 sidor
90 kronor
plus porto

Eldona Societo Esperanto
Esperantoförlaget
Retadreso: eldona@telia.com
Telefona: 070-5850054

Språkdag i Europahuset

Ungefär 400 högstadie- och gymnasieelever besökte årets upplaga av Europeiska språk-dagen, som i likhet med förra året firades i form av ett språkkafé i Europahuset i Stockholm.

Evenemanget organiserades av Nätverket Språkdagen i Sverige, där Esperantoförbundet ingår tillsammans med representanter från Europeiska kom-missionen, Språkrådet, Skolverket och olika ambassader, språk- och kultur-institut.

Eleverna var inbokade klassvis under dagen och fick gå runt i mindre grupper och besöka de medverkande organisationernas informationsbord. Där fick de lära sig lite om respektive språk, och prova på att uttala några ord och fraser. För Esperanto-förbundet deltog Olof Pettersson, Fanny Tjäder och Roland Lindblom. Inför språkdagen hölls också en tävling i att spela in en



Besökande elever talar med Roland Lindblom vid Esperantoförbundets bord. Foto: Olof Pettersson


flerspråkig rapvideo. Det vinnande bidraget, som också spelades upp för besökarna, hade titeln "Das new chanson desde Utanmyra" och hade producerats av elever från Bilingual Montessori School of

Lund. Några av bidragen finns att se och höra på Språkdagens webbplats www.sprakdagen.nu.
Olof Pettersson

Esperanto en Lerneja foiro

En Skolforum, kiu okazis la 31-a de Oktobro – la 2-a de Novembro ĉe Älvsjömässan, en la Esperanto-budo deĵoris Roland Lindblom, Linus Ganman, Hokan Lundberg, Gunilla Almér kaj Olof Pettersson.

*En la bildo dekstre: Roland Lindblom deĵoras en Lerneja foiro.
Fotis: Olof Pettersson*



Alvoko por sub-teni lernu.net

Antaŭ dek jaroj Esperantic Studies Foundation (ESF) fin-ncis grupon de entreprenemaj gejunuloj por fondi la retejon Lernu.net. Ni estis konvinkitaj, ke tio helpas al la nova genera-cio lerni Esperanton, kaj tiel ni povos konektiĝi kun homoj, kiujn ni ne povus atingi antaŭe. Nun, kiam alproksimiĝas la 10-a datreveno de Lernu, ni kredas ke

ĝi havas eĉ pli da potenco por kresko. Lernu nun estas reŝarata por fariĝi finance memstara. La nova Lernu provizos gamon de novaj servoj por faciligi aĉetojn, vendojn, abonojn, eventojn kaj donacojn inter individuoj kaj grupoj. Tiuj servoj estos disponigitaj ne nur al la Lernu-uzantoj, sed ankaŭ al tradiciaj Esperanto-organizoj kaj al ĉiuj, kiuj parolas kaj uzas Esperanton, kaj ankaŭ al tiuj, kiuj simple volas subteni la lingvon. Kiel parto de tiu ĉi strebo, la

organizo E@I lanĉis la donac-kolektan kampanjon "100 000 eŭroj por ESF".

Ni petas vin konsideri fariĝi ESF-donacanto. Vi povas donaci unufoje aŭ ĉiumonate, per la reto aŭ per la ĉeko. Kiel donacanto, vi estos rekonita sur nia virtuala "Muro de Donacantoj" de nia retejo. Por lerni pli, vizitu nian retejon: esperantic.org aŭ kampanjo.ikso.net.

Humphrey Tonkin
Prezidanto,
Esperantic Studies Foundation

Solena danko al Lisbet

Lisbet Andreasson post 24 jaroj transdonas siajn taskojn kiel ĉefdelegito de UEA kaj peranto de gazetoj kaj kongresaliĝoj al Leif Holmlund en Skellefteå. Ĉar Lisbet ne povis partopreni la svedan esperantokongreson en majo, SEF pere de estrarano Ann-Louise Åkerlund kaptis la okazon dum la Aŭtuna Festo en Malmö danki ŝin kaj transdoni donaceton.



Fotis: Alf Mobark

Aŭtuna agado en Västerås

Kiel la antaŭaj jaroj la klubo partoprenis en Viksängs-draget en la 10a de septembro. Tio estas granda merkato (*loppmarknad*) en urbkvartalo de Västerås, kie privatuloj kaj aliaj vendas ĉion ajn. Ankaŭ asocioj montras sian agadon, kiel la nia. Okazas multe da muziko de lokaj grupoj kaj lernejoj kaj samtempe troviĝas ludejoj por la infanoj. Nia klubo aranĝis loterion. Ni ne vendis multajn lotojn kaj ankaŭ ne havis multajn vizitantojn, ĉar por multaj la klubo jam estas konata.

Ĉu daŭrigi? Kial ne kiam estas senpage havi standon?

La 26-a de Septembro estas la tago de la lingvoj en Eŭropo. Tiu aranĝo estas pli interesa ol la

antaŭa ĉar tiam nia klubo estas la nura en la kafejo de la kulturdomo Växhuset. Ni povas esti tie senpage. Krome, la pedeloj (*vaktmästare*) prizorgis al ni projektoron kaj ekranon por montri filmojn, ekz. "Esperanto estas..." kaj filmon pri Instituto Zamenhof en Lomé.

Ĵurnalisto de Västmanlands Tidning intervjuis nin. Krome ŝi havis bonan proponon: ke ni traduku la frazon "vilket språk talar du". La klubaj deĵorantoj povis doni kelkajn tradukojn (en Esperanto, Angla, Dana, Germana kaj Nederlanda kaj la Franca). Ni iris ankaŭ al klaso de SFI kiu troviĝas en la sama kulturdomo. Sekve ni ricevis multe pli da tradukoj, kio ĝojigis la ĵurnaliston. Sed por ni estas interese, ke kelkaj de tiuj studentoj kiuj studas la Svedan lingvon iris al nia angulo en la kafejo por diskuti lingvajn malfacilaĵojn kaj por ricevi informojn pri Esperanto. Tri membroj de nia malgranda klubo deĵoris de la deka ĝis la dekseca.

Wim Posthuma

Grönländska – ett av de livaktigaste "urspråken"

Tusentals minoritetsspråk hotas och många försvinner. Ofta är det språk som talas av ursprungsbefolkningar. Ett av de livaktigaste språken inom denna kategori är grönländska. Fanny Tjäder berättar mer om det den 30:e november på Esperanto Centro i Stockholm.

kaj aliloke...

La aŭtunaj aktivajoj en la kluboj komenciĝis. En Göteborg la septembra renkontiĝo ofertis memorojn de la pasinta somero: Aino Åberg de UK en Kopenhago, Margareta Andersson pri pilgrima migrado ĉe Vadstena kaj kun tio kantoj de Nelo Castillo. Dum la oktobra renkontiĝo Ebbe Vilborg (en la foto) rakontis pri la aktuala laboro pri nova eldono de Lilla ordboken. Oni diskutis novajn vortojn, Nelo kantis duetojn kun Fransisco Pietro kaj fine ĉiuj partoprenis. La vendreda studcirklo de progresantoj daŭrigas.



En Helsingborg estas studrondo, cetere oni ĉefe laboras por la venontjara sveda kongreso kaj partoprenas renkontiĝojn en aliaj proksimaj kluboj.

Al Lesjöfors venis japana gasto, Joŝiteru Takahaŝi, kiu venis por konatiĝi kun Svedio kaj restos du monatojn en Lejsjöfors. Li zorgis pri la mastrumado flanke de Lennart Svensson dum la Aŭtuna Renkontiĝo. Pli pri tio vi povas legi aliloke.

En Malmö oni partoprenas la Sundan Agadon, do kun-laboro inter kluboj en Svedio kaj Danio.

En Skövde Gunnar Olsson rakontis pri la itala kongreso kaj je la posta renkontiĝo Birgitta Anevik prezentis studon de la traduko de "Hemsöborna" fare de Sten Johansson. Ŝi ĉefe diskutis la vortojn, kiujn ŝi mem ne komprenis, sed ankaŭ komparon kun antaŭa traduko de Elisabet Ohlson (el "Sveda Antologio, 1934). Birgitta diras, ke la kapacito de uzo de Esperanto dum tiu tempo estas impona.

Anita Dagmarsdotter

Helsingborg - Sundets pärla

Helsingborg - la perlo de Sundo

Helsingborg är platsen för nästa års svenska esperantokongress, (18-)19-20 maj 2012.

Vi kommer att hålla till i Folkets Hus mitt emot Gustav Adolfs Torg i södra delen av staden. Byggnaden uppfördes 1906 och den pampiga A-salen, som länge var Helsingborgs största möteslokal, restaurerades i början av

Närmare information om tider och priser kommer i nästa nummer av La Espero.

På fredagskvällen inbjuder vi alla esperantister som hunnit komma till Helsingborg, till att tura med oss på Danmarks-färjan. Att "tura" eller "ta en tura" är ett typiskt helsingborgsfenomen, som de flesta

Helsingborg estas la loko, kie okazos la venontjara sveda esperantokongreso, (18-) 19-20 majo 2012.

Ni kongresos en la Popola Domo vidalvide al la Placo de Gustavo Adolfo en la suda parto de la urbo. La konstruaĵo estas starigita en la jaro 1906 kaj la impona Granda Salono, kiu longe estis la plej granda kunvenejo en Helsingborg, estis komence de la 21-a jarcento renovigita tiel ke ĝi ricevis sian originan aspekton.

Por tiu, kiu deziras vidi iom de la ĉirkaŭaĵoj de Helsingborg, ni planas tuttagan ekskurson dum vendredo al la montara terlango Kullaberg kaj la iama reĝa somera palaco Sofiero, kies parko estas nomumita la plej bela parko en Eŭropo. Ni ankaŭ mallonge vizitos la tombon de la esperantopioniro G H Backman (1867-1928). Lian tombŝtonon starigis svedaj esperantistoj. Pliaj informoj pri la ekskurso en la venonta numero de La Espero.

Vendrede vespere ni invitas ĉiujn esperantistojn, kiuj jam atingis Helsingborgon, fari ekskurson kun ni per pramo inter Helsingborg kaj Elsinoro. Veturi tien kaj reen, manĝi kaj trinki en la restoracio sur la ŝipo, eble aĉeti ion en la butikoj, estas tipa helsingborga fenomeno, kiu nomiĝas "tura". Turistoj kaj vizitantoj, ankaŭ la helsingborganoj mem, ŝatas fari tion. Ni mendas tablon en la restoracio de unu el la ŝipoj de Scandlines. Vi mem elektos – kaj pagos – kion vi volos manĝi kaj trinki.

Bonvenon!



2000-talet till sitt ursprungliga utseende.

För den som vill se lite av Helsingborgs omgivningar planerar vi en heldagsutflykt på fredagen till Kullaberg och Sofiero, utsedd till Europas vackraste park. Vi kommer också att göra ett kort besök vid esperantopionjären Gustav Henrik Backmans (1867-1928) grav på Pålsjö kyrkogård. Hans gravsten är rest av svenska esperantister.

besökare brukar gilla. Det betyder att åka med en av färjorna fram och tillbaka mellan Helsingborg och Helsingör, ibland flera varv, äta och dricka och kanske handla i butiken ombord. Vi kommer att boka bord i restaurangen på en av Scandlines båtar. Ni väljer själva – och betalar – det ni vill äta och dricka.

Välkomna!

Rapport från Esperanto-Institutet

Det är nog inte många i Esperanto-Sverige som vet vad Svenska Esperanto-Institutet egentligen sysslar med. Vi i Institutets "operativa ledning" (la direkcio) vill därför lämna korta rapporter om vad vi gör, med början i detta nummer av La Espero.



SVEDA
ESPERANTO
INSTITUTO

Vi går tillbaka en bit i tiden. Under förra sommaren, 2010, arbetade vi intensivt med ett ytterst viktigt ärende, nämligen ansökan till Skolverket om att esperanto skall bli nationell kurs i det nya gymnasiet. Redan flera år tidigare tog vi upp saken både med Skolverket och dåvarande Myndigheten för Skolutveckling, utan att komma till något konkret resultat. Vi vände oss också direkt till departementschefen själv, Jan Björklund, och fick ett neutralt svar av hans sekreterare. I augusti 2010 måste ansökan vara inne, och vi formulerade denna så omsorgsfullt som tänkas kan, delvis med hjälp av expertis utifrån, och vi hänvisade bl.a. till professor Robert Phillipsons bok "English-only Europe?", där han påpekar, att den dominerande roll som engelskan de facto har fått i EU i själva verket strider mot EU-traktaten. I sin bok nämner professor Phillipson, att esperanto skulle vara ett bra mycket bättre alternativ som gemen-

salet språk för EU-institutionerna. Under förra hösten hade vi direktkontakt med de ansvariga på Skolverket och fick intrycket att man såg positivt på vår ansökan, men när svaret kom i februari i år, var det ett avslag. Avslaget innebär, att man inte kommer att kunna läsa esperanto på det nya gymnasiet, och att följaktligen de kurser som har ordnats på Lerums Gymnasium i drygt tio år måste läggas ner. Institutet kommer dock att gå vidare med frågan och lämna in en ny ansökan i vår. Förra sommaren ordnade SEI en kurs på tre nivåer i esperanto på Visingsö i samarbete med Braheskolan där, en folkhögskola som specialiserat sig på språk och samarbetar med flera utländska universitet. Det blev en mycket lyckad kurs, och Institutet och Braheskolan planerar en upprepning kommande sommar.

Ett annat viktigt projekt som Institutet ägnat sig åt under drygt ett års tid är utgivning av Bertils Nilssons trevliga lilla bok "Esperanto- en introduktion". Initiativet till detta projekt kom från "Esperanto i Väsby" som inför sin nedläggning ville donera återstoden av sina tillgångar till denna sak. Genom Institutets medverkan färdigställdes manuskriptet för tryckning, varefter boken trycktes i Göteborg. Den har nu distribuerats till de största och viktigaste biblioteken i Sverige, och de flesta av dessa har frivilligt betalat självkostnadspriset, så att projektet nu har gått jämnt ut.

För övrigt har Institutet deltagit i esperanto-montern på Bok- och Biblioteksmässan i Göteborg, både med pengar och föredrag, och Institutets rektor Lars Forsman har skrivit en debattartikel i Nya Wermlands-tidningen (Esperanto i en ny tid) och har även blivit intervjuad i

Folkhögskolans Tidning. Institutet har också medverkat vid information om esperanto vid Örebro Universitet.

Direktionens ledamöter följer dessutom ständigt vad som sker internationellt i esperantovärlden för att kunna bidra med det vi kan. Som exempel kan nämnas, att vi på begäran av esperantister i Bryssel har tagit fram en översättning till svenska av ett förslag till ny EU-hymn.

Folke Wedlin,
Sekreterare i Svenska
Esperanto-Institutet

Mer information om Svenska Esperanto-institutet finns på institutets hemsida www.esperantoinstitut.se


La redaktoro de Libera Folio premiita

La redaktoro de Libera Folio pasintsemajne ricevis la plej prestiĝan premion pri loka ĵurnalismo en Svedio. Kalle Kniivilä, la redaktoro de Libera Folio, pasintĵaŭde kune kun du kolegoj en la ĵurnalo Sydsvenskan gajnis la plej prestiĝan premion pri loka ĵurnalismo en Svedio. La premio konsistas el 75 000 svedaj kronoj. La premion oni aljuĝis pro artikolserio pri lernejo, kie okazis dum mallonga periodo multaj ŝanĝoj de instruistoj kaj lernejestroj. En la motivo la ĵurio aparte mencias la fakton ke oni metis la lernejanojn en la centron de la raportado kaj tiel igis la problemojn evidentaj. La lernejo fariĝis koncepto tutlande kaj la artikoloj kaŭzis realajn ŝanĝojn. La premion disdonas ĉiujare la ĵurnalo Nerikes Allehanda.

Maria Sandelin

Oktobra semajfino en Lesjöfors

Esperanto-Gården en Lesjöfors aranĝis aŭtunan semajnfino, en kiu estis prelegoj, diskutoj kaj muziko. Partoprenis 18 personoj el kvar landoj.



*Harald Schicke
Fotis: Roland Larsson*

Preleganto estis Harald Schicke el Herzberg en Germanio. Li estas kuracisto pri naturmedicino, kaj faris du prelegojn. La unua estis buŝe tradukata por grupeto da lokaj vizitantoj, kiuj trovis informojn pri la prelego en artikolo en loka ĵurnalo. La tradukon faris Martin Strid. Dua prelego temis pri la koro kaj la sangofluo en la korpo. Schicke prelegis en bone komprenebla kaj pedagogia maniero pri tiuj komplikaj temoj. Alian prelegon faris Stella Lindblom, pri simila temo de natura kuracado.

Esperanto-Gården havis sian jarkunvenon dum la semajnfino, en kiu ankaŭ okazis diskuto pri la estonteco de la domo kaj ĝiaj aktivecoj. La kunveno elektis estraron, kaj notis la bezonon de laborgrupoj ekster la estraro kaj la bezonon de helpantoj pri la estrara laboro.

En la programo estis du diskut-horoj, el kiuj unu temis ĝenerale

pri la estonta esperanto-laboro en Svedio.

La dua diskuto temis pri la Sveda Esperanto-Instituto, laŭ iniciato de Esperanto-Gården, kiu estas unu el la sep organizaĵoj, kiuj membras en la instituto. Ambaŭ diskutoj donis multajn diversajn pensojn, kiuj poste povos esti bazo por pliaj diskutoj.

Du muzikantoj el Gotenburgo, Göteborgs-strängarna, muzikis kan kantis en diversaj lingvoj, kaj ankaŭ Martin Strid partoprenis la muzikadon. Kiel helpanto je la manĝopreparoj servis Takahashi Yoshiteru el Japanio, kiu pasigas du monatojn en Svedio por lerni pli bone esperanton kaj la svedan.

Ulla Luin

Ny styrelse för Esperanto-Gården valdes den 30 oktober:

För två år valdes Anders Ryländer, Jan Svensson och Lennart Svensson.

För ett år valdes Siri Bartusch och Wim Posthuma.

Suppleanter för ett år är Douglas Draper och Martin Strid Revisorer är Sten Svenonius och Ulla Luin och suppleant Stella Lindblom.



Göteborgssträngarna kaj Martin Stridh. Foto: Roland Larsson



Esperanto- gården 2012 Esperanto-Gastejo 2012

Trivselhelg

Esperanto-Gården i Lesjöfors inbjuder till en träff i vintermiljö 5-8 januari 2012.

Kom gärna tidigare, öppet även i december. Spontankurser i esperanto och olika aktiviteter!

Mat och boende till självkostnad. En träff för alla med esperanto-intresse. Tag gärna med barn och barnbarn - låt det hela utvecklas till en familjeträff i glädjens tecken.

Intresseanmälan före 10 december till e-post:

egarden@esperanto.se
eller per telefon 0590-30909

Sommarkurs

2012 års sommarkurser på Esperanto-Gården i Lesjöfors Ankomst söndag 8:e juli Undervisning i följande nivåer: Nybörjare, fortsättning, konversation, barn plus eventuell temakurs. Hemresa 15 juli.

Prenumerera!

SEF erbjuder sina medlemmar att prenumera på esperantotidningar för 2012. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på plusgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses. Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, 93138 Skellefteå
Tel 0910-733810. leif.holmlund@telia.com

Tidning	Nr/år	Pris kr
Esperanto	11	350,00
Esperanta Finnlando	6	225,00*
Esperanto en Danio	5	136,00
Femina	4	280,00
Heroldo	17	446,00
Juna Amiko (rabatt från 3 ex)	3	149,00
Kontakt	6	210,00
La Jaro	1	85,00
La Kancerkliniko	5	233,00
La Ondo	11	400,00
La Ondo rete		111,00
Literatura Forio	6	410,00
Litova Stelo	Provizore ne aperas	
Monato	11	543,00
Monato retversio		300,00
Norvega Esperantisto	6	130,00
Oomoto, nur rete		
www.oomoto.jp/esrevuo/Oo453.pdf		
Ret-ventoj		
www.esperanto.hu/eventoj/		
Scienca Revuo		*

Tidningar markerade med * har inte lämnat prisuppgift för 2012.

Från New York

Nijl Blonstein från New York – aktiv esperantist sedan 40 år och under tre år UEA-representant vid FN i New York – besökte Göteborg 3–5 augusti. Han kom från Universala Kongress i Köpenhamn och var på väg till en kongress i Oslo. Några göteborgsesperantister tog hand om honom och träffade honom först på Språkcaféet 3 augusti. Följande dag tog Siv Burell och Margareta Hörke med honom ut till Vrångö. Dagen därpå gjorde han staden på egen hand och träffade Inga Johanson på Stadsbiblioteket, där han besåg esperantoavdelningen.

Ur medlemsbrev för Göteborgs Esperantoförening

TRA LA LANDO

Esperanto i nöd och lust

Göteborgs-Posten har haft en artikel om Magnus Henoch, som genom sitt språkintresse i 14-årsåldern lärde sig esperanto på egen hand. Han hade hört att om man kunde esperanto så skulle det vara mycket lättare att lära sig andra språk.

Idag kan han svenska, esperanto, engelska, tyska, spanska, ryska och polska. Flera av dessa har han också lärt på egen hand och nu håller han på att lära sig ungerska. Magnus och Saša träffades på en esperantoträff i Ukraina, Sašas hemland. 2008 gifte de sig och flyttade till London. Esperanto är nu en stor del av deras vardag och sociala nätverk. "Vi har gjort lika stor ansträngning för att nå varandra", säger Saša och därför tror hon att de är mer jämlika än andra tvåspråkiga par. Om det får barn kommer esperanto att bli modersmålet. Esperantister är ofta väldigt fördomsfria och idealistiska människor, som engagerar sig för en bättre värld. Att tala esperanto är en del av det, säger Magnus. En del tror att det skulle vara fred på jorden om alla talade esperanto. Jag tror inte att det är så enkelt. Det hjälper en del att kunna prata med varandra, men språkförbistringen är inte det enda upphovet till problemen i världen, säger Magnus.

Kaisa Hansen



Oranĝa renkontiĝo en Härnösand

Laŭ mi Oranĝa Renkontiĝo fariĝas pli kaj pli bona. Mi ĉeestis ĉiujn krom la pasintjaran. Kiel kutime estis kaj novaj kaj malnovaj programeroj. Kiel ĉiam ni saŭnumis kaj banis nin en la lago, kiu komence de oktobro estis tre malvarma. Starante sur la kajponto (*bryggan*) knabino logkantis (*kulade*) kiel oni faris antaŭe por logi la bovinojn. Sur la ponto ni ankaŭ spektis fajrospektaklon. Du knaboj svingis fajroglobojn samtempe kiam alia drumis sur kuirejaĵojn. Kaj kelkaj el ni spektantoj lekis fingron sur vinglasoj tiel ke sonis. Fariĝis tre speciala sento. Preskaŭ kiel estus religia ritualo. Mi multe ŝatis ĝin. Aliaj programeroj estis pentri, verki poemojn, triki kaj kolekti fungojn. Ankaŭ kiel kutime estis bonaj koncertoj.

Ankaŭ eblis veni al la renkontiĝo pli frue kaj foriri pli malfrue. Mi kaj multaj aliaj uzis tiun eblecon. Tiam ni interalie spektis filmojn. Unu el la filmoj kiun ni spektis estis la klasikaĵo kaj por Esperanto grava "Populara muziko el Vittula" kun esperantaj subtitoloj.

Ĉeestis la renkontiĝon 35 homoj el kiuj 17 estis eksterlandanoj el Rusio, Ukrainio, Germanio, Nederlando, Danio, Anglio, Finnlando, Norvegio, Irano, Tunisio kaj Aŭstralio.

Johan Krig Ölund


Diservo dum UK en Kopenhago. Granda studo pri UEA

Mi kaj mia edzo frue decidis kiel kutime partopreni la diservon dum UK. Malgraŭ forta pluvo kaj vento multaj kristanoj kolektiĝis en la bela preĝejo "Vor Frue" (Nia Sinjorino)

La diservo estis bela kaj interesa. Muziko kaj bona etoso. Por la unua fojo mi aŭdis en preĝejo pastroj de malsimilaj eklezioj paroli afable pri la diferencoj kaj similaĵoj inter la eklezioj. Tre interese. Interkomprenemo kaj preĝoj al la sama dio donis bonan etoson, kaj ni sentis ke la vizito indus pluvan promenon.

Ingrid Näsholm

Deĵorantaj pastroj en la Esperantlingva diservo en la Universala Kongreso de Esperanto en la Katedralo de Kopenhago. Foto: Ingrid Näsholm



Instruistoj honoris

La komitato de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) dum sia konferenco en Danio en la 19a de Julio 2011 elektis du honorajn membrojn: Bertil Andreasson – iama kasisto de ILEI tra 17 jaroj kaj Mauro La Torre – plurjara antaŭa prezidanto de ILEI. Ambaŭ Honoraj Membroj multe laboris por ILEI kaj estis gravaj personoj por la progreso de ILEI.

La Espero gratulas!

Kiu havu la potencon en la movado, la centra asocio aŭ la landaj asocioj? Pri kio esperantistoj kverelis en la 1910-aj, 1920-aj, 1930-aj kaj aliaj jaroj? Ĉu Lapenna estis bona prezidanto? Ekzemple tiujn demandojn respondas baldaŭ aperonta verko de Ziko van Dijk, "Historio de UEA". Temas pri iom modifita esperantlingva versio de lia disertaĵo. La verko havas kvincenton da paĝoj, sed estos senpage elŝutebla, unue ĉe Libera Folio kaj poste ankaŭ ĉe aliaj retejoj. Tiu estas la plej bona maniero atingi vastan publikon en Esperantujo, kaj la Esperantan version Ziko van Dijk ellaboris ĝuste por ekhavi pli da legantoj ol havis la germana versio, li rakontas en intervjuo de Libera Folio, kiu jam publikigis unu ĉapitron el la verko.

www.liberafolio.org

Ĉu Esperantista Nobelpremioto?

Denove agnosko por nia literaturo, danke al Esperanta PEN-Centro: ĝin invitas la Sveda Akademio kandidatiĝi verkiston al la literatura Nobelo 2012. La invitleteron subskribis la prezidanto de la koncerna komisiono, el Stokholmo.

La Esperanta PEN, laŭ propono de sia membro Manuel de Seabra, en 1998 iniciatis la kandidatiĝon de William Auld, kiu estis ĉiujare reproponita ĝis sia morto. Post interna konsultiĝo, en 2007 la sola asocio de profesiaj verkistoj kaj redaktoroj en esperanto proponis István Nemere (kune kun Umberto Eco), kaj post dua interna konsultiĝo ekde 2008 ĝi proponas d-inon Marjorie Boulton. Tio ripetigos en 2012.

Alia verkisto en esperanto, Baldur Ragnarsson, estis kan-

didatigita dum lastaj jaroj por la literatura Nobelopremio, fare de faka asocio de UEA. La faka asocio tamen malfondiĝis en 2008, kaj la literatura akademio kiu postvenis ĝin probable plu flegis la kandidatiĝon, kvankam la preskaŭ vegeta stato de tiu akademio dubigas pri efektiva ripetiĝo.

www.esperantio.net

Erasmus en reta kinejo

En la 34-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 14-an de majo 2011 d-ino Vera Barandovská-Frank prelegis pri la granda humanisto Erasmo de Roterdamo. La temo de tiu Malferma Tago estis elektita omaĝe al la 500-a datreveno de la plej fama verko de Erasmo, Laŭdo de l'stulteco. Esperanta eldono de la verko, tradukita de Gerrit Berveling, aperis en 1988.

La prelego de d-ino Barandovská-Frank estas nun spektebla en tri partoj en la Reta Kinejo de UEA:

<http://www.vimeo.com/album/1712870>

Per la Erasmo-filmo la Reta Kinejo de UEA komencas transiron el sia ĝisnuna loko en Ipernity al Vimeo.

www.uea.org

Kursoj por komencantoj kaj daŭrigantoj 18-19/2 2012

Semajnfina kurso por komencantoj okazos en Malmö 18-19/2 kaj kurso por daŭrigantoj dimanĉe 19/2.

Helpu varbi por la komencanta kurso kaj partoprenu mem por spertiĝi kun la daŭrigantoj!

Kursgvidantoj estos Kim kaj Ann-Louise.

Anmalan/ information: esperantoagado@yahoo.com.

Kalmo

Mi aŭdas lin adiaŭi, li havas la malaltan voĉon, la telefonan voĉon. Panjo ne plu aŭdiĝas, eble ŝi nenion diras aŭ parolas tro mallaŭte. Poste la pordo fermiĝas kaj liaj paŝoj kraketas sur la gruzo kaj malaperas. Kiam nenio plu aŭdiĝas, mi eliras el la neceseja budo kaj kuras malantaŭ la domo foren al la monteto. Kiam mi atingas tiel alten, ke mi vidas la havenan golfon de supre, la ŝipeto jam debordiĝis kaj turnas la pruan eksteren. Poste ĝi ekrapidas tra la akvovasto, kaj tuj poste la motorbruo atingas min. Mi prenas ŝtonon el la amaseto, dumanan ŝtonegon, kaj ŝovas ĝin suben laŭ la krutaĵo. Ĝi ruliĝas malsupren kaj haltas ie, kie la deklivo malkrutiĝas. Mi ĵetas ankaŭ kelkajn ŝtonetojn, ili atingas pli foren, sed ĝis la bordo kredeble neniu fortas ĵeti ŝtonon.

Poste mi iras iom malsupren kaj sidiĝas en mia fendaĵo inter la ŝtonblokoj. Tie kuŝas kelkaj cigaredstumpoj, mi scias ke ili estas de liaj cigaredoj, kiujn mi pinĉis el lia laboreja jako. Estas neniu vento, la golfo sub mi etendiĝas tute brila, la akvo nur iomete spiras pro malnova hulo. Mi pensas pri lia brusto, kiam li dormas matene kvankam panjo jam ellitiĝis, kaj poste pri la barbostoploj antaŭ ol li razas sin. Ekde nun mi ne plu povos ŝteli cigaredojn. Mi prenas stumpon por flari la figan odoron de tabako, sed ĝi odoras nur malintense je iama fumo.

Mi scivolas, ĉu tio estas vera, kion kriaĉis panjo. Ĉu li havas iun alian? Mi klopodas imagi ŝian aspekton de filmstelulino kun duone malbutonita bluzo super la mamzono, sed kial iu tia volus esti kun li? Mi ne komprenas. Kredeble troviĝas neniu alia, tio estas nura fantazio de panjo. Li sendube havas nur sian laboron, kiam li ne estas kun ni.

Sur la golfo iras pluraj motorboatoj, kaj mi vidas postsulkon

eĉ kiam ili malaperis trans la kabon. Sed tio ne longe daŭras, baldaŭ la spuroj estas for kaj la akvo kuŝas same spegulbrila kiel antaŭe.

Restas du aŭ tri semajnoj de la someraj ferioj, kaj mi preferus nun reveni en la urbon, sed panjo neniam akceptus tion. Somere ŝi abomenas restadi en urbe.

Mi restas tie supre ĝis malfrua posttagmezo. Tiam mi subeniras, tamen ne hejmen sed ĝis la banrokoj. Estas du knabinoj tie, Tora kaj iu amikino, kiu vizitas ŝin. Ili ekzercas sin pri plonĝado, ŝajnas. Mi sidiĝas gapi al ili.

Post iom Tora ekvidas min.

“Saluton. Ĉu vi banos vin?”

“Ne.”

“Kial ne? Estas agrable.”

Ne indas respondi. Mi ne volas nun hejmeniri por preni banŝorton, sed tio ne estas ilia afero.

Ankaŭ la dua knabino kelkfoje rigardas miadirekten. Poste ili ĉesas plonĝadi kaj volvas siajn bantukojn ĉirkaŭ si, sed ili ne foriras. Ili restas sur la roko parolante, tamen mallaŭte, tiel ke mi ne povas aŭdi kion ili diras. Tiu amikino vizitas ŝin de semajno, kaj mi kelkfoje jam aŭdis ŝin paroli. Ŝi sonas kiel vera altklasulino. Eble ankaŭ Tora estas tia, sed ĉe ŝi oni ne rimarkas tion.

Mi turnas min kaj paŝas malrapide supren ne zorgante pri ili. Tiam mi aŭdas la amikinin diri ion kaj ridi. Ankaŭ Tora dum momento subridas.

Mi vidas kuŝi bonan ŝtonon, do mi prenas ĝin enmane kaj palpas ĝin. Ĝi estas ete oblonga kaj plata, sed kun rondigita formo.

Mi celas al la amikino kaj ĵetas ĝin. Ŝi ekkrias kaj cedas dorsen, la ŝtono trafas la kapon de Tora kaj poste dufoje resaltas de la roka grundo antaŭ ol plaŭde enakviĝi. Tora kolapsas, la amikino klopodas kapti ŝin sed ne sukcesas fikstani, do ŝi falas dorsen sur la rokon kaj glitas malsupren.

“Tora!” krias la amikino. Poste ŝi pepas: “Helpu! Helpu, li estas freneza!”

Ŝi kaŭras kaj kaptas la brakojn de Tora, trenas ŝin iomete supren laŭ la roko kaj klinas sin super ŝi.

“Tora, Tora, ĉu vi aŭdas min?” ŝi diras.

Ŝia voĉo plenas je ploro. Sur la akvo ankoraŭ videblas rondoj post la ŝtono.

Mi restas staranta kaj ne aŭdas, ĉu ŝi ricevas respondon. Ŝi rigardas supren al mi kun mieno tute furioza. Poste ŝi plu provas havi kontakton kun Tora, kliniĝas profunde super ŝi skuante ŝiajn ŝultrojn kaj brakojn. Fine ŝi salte stariĝas, volvas sian bantukon ĉirkaŭ si kaj forkuras tia, kia ŝi estas, nudpieda, en bikino kaj flava bantuko.

“Freneza diablo”, ŝi krias al mi. “Ŝi eble mortos!”

Mi vidas ŝin malaperi direkte al la haveno kaj la domoj. Poste mi iras malsupren al Tora. Ŝi kuŝas surdorse kun fermitaj okuloj, metron for de la akvorando. Sango fluetas tra ŝiaj helaj haroj. Kliniĝante proksime super ŝi, mi vidas ŝin spiri. La bantuko kuŝas apude kun unu fino sub ŝi kaj la alia enakve. Mi rigardas ĉirkaŭ mi. Ankoraŭ restas kalme, kaj la akvo ne plu hulas. Mi sentas kvazaŭ mi devus fari ion, sed mi ne scias kion. Pensoj flugas tienreen tra la kapo. Mi povus mane ĉerpi akvon kaj forlavi la sangon el ŝia hararo. Aŭ kapti ŝin kaj ŝovi la tutan korpon enakven. Se ŝi estus la amikino, mi eble farus tion. Mi povus tiri suben ŝia blua bikino por esplori, ĉu Fredo pravis dirante, ke blondulinoj havas brunajn piĉarojn. Sed mi ne volas tuŝi ŝin. La bikino sube estas malseka, mi ne scias ĉu pro mara akvo aŭ ĉu ŝi pisis falante.

Mi scias, ke baldaŭ plenkreskuloj alvenos el la domaro. Eble ŝia patro. Do mi nur unufoje tuŝas ŝian vangon per la fingroj, poste mi foriras de tie, reen ĝis mia fendaĵo sur la deklivo. Mi *Daŭrigo en paĝo 11.*

Iitate, Mia Revo

Mi estas malmoderna lokomotivo nomata Jaemon, tamen mi ne estas vera lokomotivo. Mi estas la heroo en la infanlibro "Lokomotivo Jaemon". Mi jam de multaj jaroj plaĉas al multaj infanoj, sed infano, al kiu mi estis donacita, ial ne ŝatis min. Eble al tiu infano pli plaĉis herooj en televido, ol tiuj en infanlibroj, do lia patrino portis min kaj aliajn dek infanlibrojn al la distrikta rubejo. Mi estis tre malĝoja, ĉar mi bone sciis, ke poste mi iros al fabriko, kie oni metos nin, paperaĵojn, en grandan kuvon kun kelkaj medikamentoj kaj baldaŭ ĉiuj fariĝos kiel koto.

Tuj poste venis virino al la rubejo kaj trovis nin.

"Ah, belaj libroj! Kial oni forĵetis tiujn bonajn librojn? Precipe tiu libro 'Lokomotivo Jaemon' tre plaĉis al mia filo antaŭ 30 jaroj.

Kalmo

Daŭrigo de paĝo 10

scias, ke oni serĉados min, sed mi preferas esti tie ol endome kun panjo kaj la fratino, kiam oni trovos min.

Post kelka tempo mi vidas du rapidajn motorboatojn debordiĝi kaj malaperi direkte al la ĉeftero. Eble unu el ili kunportas Toran, en ĉi tiu distanco tio ne videblas. La postsulkaj sufiĉe rapide viŝiĝas. Vespere, kiam la suno eniras nubojn fore super la ĉeftero, ekblovas brizo kiu krispigas la havenan golfon. La vento malvarmetas, sed la ŝtonblokoj ankoraŭ restas varmaj. Mi ne malsatas, kvankam mi nenion manĝis de matene. Sed mi ŝatus havi ion trinkeblan, aŭ cigaredon. Se mi havus, mi flarus la tabakon kelkatempe, antaŭ ol ekbruligi ĝin.

Je la naŭa, kiam ili alvenas preni min, lumo restas nur super la akvo. En la fendaĵo, kie mi sidas, jam estas mallume.

"Ĉu vi estas tie?" diras panjo.

"Ne", mi diras. "Mi ne estas."

Sten Johansson

Mi donacos tiujn librojn al mia nepo".

Ŝi kunportis ĉiujn librojn hejmen. Ŝi tuj telefonis al sia filo, demandante, ĉu li volas ricevi nin, sed kontraŭ ŝia antaŭsupozo, li rifuzis. Ŝi estis mal-kontenta, sed ŝi konsolis sin, pensante, ke li havas sian propran kialon, kaj metis nin en la stokejon. Ah, ni devis vivi senespere en mallumo.

Post kelkaj monatoj, tiu virino malfermis la pordon de la stokejo. "Vi estas ankoraŭ belaj. Mi sendos vin al iu vilaĝo, ĉar tie infanoj volas vin". Ah, kiel ĝoja ni estis! Ŝi pakis nin kaj portis nin la la najbara oportuna vendejo por ekspedi nin.

Ni vojaĝis dumnokte kaj en la venonta tago atingis iun vilaĝon ĉirkaŭatan de kampoj kaj montetoj. Tie oni portis nin al la granda salono. Jam tie estis multaj pakajoj similaj, kiuj estis plenaj de infanlibroj. Homoj, kiuj prizorgis la pakajojn, interparolis:

"Vere estas multaj bonkoraj japanoj. Jam venis tiom multe da libroj al nia vilaĝo".

"Ĝis nun al nia biblioteko mankis infanlibroj, do niaj infanoj kaj geknaboj ne havis ŝancon legi bonajn librojn".

"Nia vilaĝestro havis vere bonan ideon! Neniu el ni havis ideon kolekti uzitajn librojn el la tuta Japanio".

"El la infanoj, kiuj legis tiujn librojn, espereble naskiĝos grandaj verkistoj".

Tiu vilaĝo estis nomata Iitate en la gubernio Fukuŝima. Ĝi estas malgranda vilaĝo kun 6000 loĝantoj. Nuntempe malgrandaj vilaĝoj kaj urboj havas malfacilon finance, kaj preskaŭ ĉiuj provis/as kuniĝi kun pli grandaj urboj, sed la vilaĝestro de Iitate ne volis tion.

Li opiniis, ke se la vilaĝanoj kunlaboros, ili venkos ĉiajn malfacilojn. Peti donacojn de libroj el la tuta Japanio estis unu el la ideoj de la vilaĝestro.

Vilaĝanoj laboris kun la vilaĝaj funkciuloj por aranĝi nin sur la

bretojn, kaj baldaŭ ni ĉiuj estis bele vicigitaj. Ceremonio por malfermi la infanbibliotekon okazis kaj multaj infanoj venis kun gepatroj. Tiamaniere niaj feliĉaj tagoj komenciĝis. Precipe mi estis tre ŝatata de infanoj, ĉar en tiu vilaĝo ne estas stacidomo, tial ne venas trajno. Mi estas malmoderna lokomotivo, kiu kuris per karboenergio, sed pro tio infanoj des pli amis min. Gepatroj legis min, montrante al ili bildojn en la libro. Infanoj petis de siaj gepatroj legi min multajn fojojn. Certe en ilia kapo vera lokomotivo Jaemon kuris kun nigra fumo.

Mi vizitis multajn lokojn en la vilaĝo kun infanoj. Mi iris al la tendumejo Aino-saŭa, kie oni povas ĝui naturan vivon. En la tendo aŭ sub la stelplena nokta ĉielo gepatroj legis min kaj aliajn librojn al siaj infanoj. Certe ili vidis lokomotivon kuri inter la stelaroj. Iu familio vizitis Met-iistan Centron, kie oni povas mem fari diversajn lignaĵojn. Iu infano faris lokomotivon similan al mi.

Ah, ne forgesende estas, ke la vilaĝo havis librejon "Arbaro de libroj" posedatan kaj administratan de la vilaĝo. Ankaŭ tio estis la ideo de la vilaĝestro. Li volis, ke la vilaĝanoj alkitimiĝu al libroj, kaj por tio li malfermis la vilaĝan librejon, ĉar ne estis librovendejo en la vilaĝo. Li opiniis, ke sen libroj, nome sen kleraj homoj, la vilaĝo ne progresos.

Por alkitimigi infanojn kaj lernantojn al libroj, oni regule organizis en la biblioteko "Kunsidon por voĉlegi infanlibrojn". Oni elektis librojn kaj legis ilin, montrante bildojn en ili sur la ekranon. Ankaŭ en tiu okazo mi estis tre populara. Infanoj volis aŭskulti mian rakonton. Feliĉajn tagojn mi havis.

Dume mi ofte aŭdis vilaĝanojn uzi vorton *madei*. Mi ne komprenis, kion ĝi signifas. Certe ĝi estas loka vorto. Iun tagon turisto demandis la vilaĝanon

pri la signifo. Tiu lasta kun fiero respondis: “*Madei* devenas de la vorto *made*, ambaŭ manoj. Do ‘laboru *madei* signifas ‘laboru per ambaŭ manoj’, nome diligente, atenteme, elkore, sincere ktp. La vilaĝano plu klarigas jene:

Antaŭ 5 jaroj la vilaĝestro proponis, ke la vilaĝa politiko baziĝu sur “malrapida vivo”, sed ni ĉiuj kontraŭis lin, ĉar en la moderna socio, ĉio devas esti rapida. Ni opiniis, ke se ni malrapide farus ĉion, nia vilaĝo fariĝus ŝtonepoka vilaĝo. La intenco de la vilaĝestro estis la alia, sed ni ne komprenis tion. La vilaĝestro cerbumis, kiamaniere li povos komprenigi al ni sian veran intencon. Tiam li rememoris la vorton *madei*, kiu estis uzata de maljunaj homoj. Li adoptis tiun vorton kaj proponis “*madei*-vivon”, kaj ĉi-foje ĉiuj konsentis. Jam de 5 jaroj ni agadas laŭ tiu principo. Ni ĉiam diras inter ni, ekzemple,

“Vartu vian bebon *madei*, se ne, poste vi havos problemon pri ĝi”,

“Manĝu *madei*, se ne, via korpo fariĝos malforta” aŭ

“Laboru *madei*, tio estas la unu sola vojo por via sukceso”.

Al la biblioteko venis multaj homoj, precipe junaj patrinoj.

Tiuj lastaj prunteprenis malfacilajn librojn kiel “Bonfarto en Svedio”, “Renesanca arto en Italio” kaj “Franca revolucio”. Ili ofte babilis inter si pri tio, kiamaniere persvadi sian edzon pri sia vojaĝo. Mi ne komprenis, kial ili tiamaniere diskutas kaj legas tiajn malfacilajn librojn. Tamen mi komprenis iom post iom el iliaj babiladoj.

La vilaĝo havis projekton “Flugiloj de junaj edzinoj”, en kiu la vilaĝo sendas junajn edzinojn al Eŭropo dum la plej okupita sezono por la rizkultivado. Kial en tia sezono? Tio estis unika ideo de la vilaĝestro. Se edzinoj forestos dum tiu periodo, edzoj havas malfacilon sen iliaj helpoj. Edzoj ne bonvenigas la vojaĝon de sia edzino. Por realigi la

vojaĝon, edzinoj devas persvadi sian edzon per diversaj manieroj, montrante, kiom da bono tiu vojaĝo donos al ŝi, al la famlio, al ŝiaj gefiloj kaj al la vilaĝo. Por tio edzinoj devas mem konvinkiĝi pri la utilo de sia vojaĝo. Ili devas lerni multe. Kiam ili sukcese vojaĝas al Eŭropo, ili ne nur turismas, sed ankaŭ lernas multe por montri la frukton al siaj familianoj. Tial junaj patrinoj ofte venis al la biblioteko, kaj komprenoble kun siaj gefiloj. Do la infanoj en la vilaĝo tre ŝatis legi librojn.

Tamen nia feliĉa vivo subite ĉesis. Posttagmeze la 11an de marto ni sentis grandan skuon. Kio okazis? Ni tute ne komprenis. La tero tremis, tremegis. La biblioteko skuis, skuegis. Ni falis el la bretoj al la planko. Preskaŭ ĉiuj libroŝrankoj falis kaj vitroj rompiĝis. Homoj eksteren kuris terurite.

“Granda tertremo okazis!”

“Nia vilaĝo estas fore de la maro, do ne venos cunamo, sed certe al la marbrodo”.

“Mia filo laboras en la nuklea centralo laŭ la marbordo. Ĉu ĝi ne difektiĝis?”

“Ne timu. La elektrokompanio Tokio kaj la registaro ĉiam garantiis, ke la nukleaj centraloj estas konstruitaj tiel forte, ke neniam okazos akcidentoj al ili”.

“Sed la tremado ne estis ordinara. Mi esperas, ke nenio okazos al ili”.

Mi estis premata inter falintaj libroj, sed klare aŭdis maltrankvilajn voĉojn de la vilaĝanoj. Baldaŭ fariĝis senhome en la biblioteko. Ekstere homoj kuradis kaj dumnokte bruis.

En la venonta tago ni estis en la sama stato. Neniu venis. Ni estis maltrankvilaj. Baldaŭ amasiĝis nekonataj homoj antaŭ la biblioteko. El kie kaj por kio ili venis? Posttagmeze antaŭ la 4a horo mi aŭdis bruegon similan al tondro. Nenie estas nubo kaj estis bona vetero, sed aŭdiĝis teruriga bruego, kiel bombo eksplodis.

Venis multaj homoj en la bibliotekon. Oni forŝovis nin, falintajn librojn, en la angulojn kaj faris spacon. Homoj amasiĝis. Ili havis preskaŭ nenion. Estis klare, ke ili venis kun granda hasto, eskapinte el iu

grava akcidento. Ĉu venis cunamo? Sed neniu estis malseka. Ĉu tiu akcidento en la nu...kle...a centra...lo? Kio estas nuklea centralo? Mi estas lokomotivo de karboenergio, do mi ne komprenis, kio estas nukleo. Ĉu ĝi ne estis sekura?

Homoj mallaŭte interbabilis:

“Neniam mi antaŭvidis akcidenton”.

“Ne maltrankviliĝu. Certe ni povos reveni hejmen post du, tri tagoj”.

“Ni trankvile tranoktu ĉi tie”.

Elektro ne funkciis. Oni distribuis lankovrilojn, kiujn la vilaĝo rezervis por la krizo. Oni distribuis ankaŭ botelojn da akvo, sed ne venis manĝaĵoj. Infanoj ekkriis pro malsato. Beboj volis lakton, sed patrinoj ne havis varman akvon. Iu maljunulo kriis: “Mi forgesis kunporti medikamenton”. Iu maljunulino malsaniĝis. En marto estis ankoraŭ malvarme, tial homoj ne bone dormis pro manko de kovriloj.

Tamen venis mateno. Homoj rigardis al la sudo, sed nenio vidiĝis krom montetoj kaj nuboj. Nia vilaĝo estas 30 kilometrojn fore de la nukleaj centraloj, kaj inter la du lokoj estas montetoj. Neniu neordinara estis sentebla. Homoj, kiuj tranoktis en la librejo, estis loĝantoj de la urbo Hutaba, kie tiu centralo situas. La registaro estis ordoninta, ke homoj en la radiuso de 20 kilometroj de la centralo rifuĝu eksteren.

Unu tago, du tagoj, tri tagoj pasis, sed ili ne povis reveni hejmen. Kun maltrankvilo ili silente restis en la librejo. Ili havis neniun laboron, tial iuj komencis rearanĝi la libroŝrankojn kaj nin, falintajn librojn. Mi sentis min preskaŭ morta pro la premo inter aliaj libroj, sed fine mi estis savita. Ni estis remetitaj sur la bretojn kaj bone vidis la amasiĝintajn homojn.

Iu juna patrino prenis min kaj legis min por la infanoj. Kiel feliĉa mi estis! Sed kontraŭe la legantino estis malgaja, kvankam ŝi kuraĝigis sin ŝajni vigla. “Al mi tre plaĉis tiu libro ‘Lokomotivo Jaeman’, kiam mi estis infano”, ŝi diris. Mi preskaŭ eklarmis. Homoj restadis en la biblioteko kaj en aliaj

konstruaĵoj. Vilaĝanoj de litate prizorgis rifuĝintojn.

La 5an de aprilo la registaro publikigis, ke el la tero kaj herboj kolektitaj el nia vilaĝo la 28an de marto, oni detektis radioaktivecon. La registaro aldonis, ke la kvanto ne estis tiel multa, do la loĝantoj ne maltrankviliĝu.

La 11an de aprilo la registaro ordonis, ke homoj rifuĝu "laŭ la plano" ĝis la fino de majo el la 5 urboj kaj vilaĝoj situantaj eĉ ekster la radiuso de 20 kilometroj de la nuklea centralo n-ro 1, ĉar ili estas malpurigitaj per radioaktiveco de pli ol 2 milisivertoj jare. Nia vilaĝo estas fore de la nuklea centralo, sed malfeliĉe flugas de la centralo al ĝi ventoj, kiuj portis kaj faligis radioaktivaĵojn en ĝin. Nia vilaĝo estis unu el tiuj 5 komunumoj.

Pro tiu ordono, kiuj restis en nia vilaĝo el la urbo Hutaba, tiuj jam forkuris pli foren, kaj ni, kiuj akceptis tiujn rifuĝintojn, devis forlasi la vilaĝon. Familoj, kiuj havis bebojn kaj infanojn, estis terurigitaj pro pli grava influo de radioaktiveco al infanoj, kaj senprokraste fuĝis el la vilaĝo. Multaj aliaj volis plu resti hejmen, ĉar oni ne povis senti danĝeron de radioaktiveco ne videbla, ne sentebla, ne tuŝebla kaj ne aŭdebla. Multaj posedis brutaron por prizorgi, multaj havis kampojn por kultivi, multaj havis laboron por plenumi. Ĉiuj havis karan memoron al sia hejmo. Estis malfacilege forlasi sian hejmon. Tamen radioaktiveco plu minacis ilin, kaj fine la 15an de majo la unuaj 10 familioj grupe forlasis sian vilaĝon.

La vilaĝestro salutis al ili kun larmoj: "Mi estas tre malĝoja. Ni celis igi nian vilaĝon la plej bela vilaĝo en Japanio, sed nun nia vilaĝo fariĝis alisignife fama en la mondo. Dum multaj jaroj ni protektis tiun vilaĝon, zorgante rizplantojn kaj brutaron, kontraŭ multfojaj malvarmaj klimatoj. Tiujn niajn laborojn frakasis la nukleaj centraloj. Mi

malamas ilin. Ni ne malvenkos. Mi strebas per mia tuta forto por ke ĉiuj vilaĝanoj povu reveni hejmen plej frue. Ĝis tiam fartu bone!" Estis klare, ke la elektro kompanio kaj la registaro tute ne estis *madei*, kaj perfidis la loĝantojn.

En unu el la familioj estis knabo nomata Akira. Antaŭ la ekiro, li kuris en la bibliotekon kaj petis de la prizorgantino prunteprenon de mi. Mi tre plaĉis al li kaj sen mi li ne volis ekiri. La prizorgantino volonte permesis tion, ĉar jam neniu havis intereson pri libroj. Akira enaŭtigis kun mi en siaj manoj kaj forlasis la vilaĝon.

La familio de Akira atingis iun urbon. Oni senpage pruntedonis al la familio apartamenton. Ĝi situis en iu malnova loĝkvartaro, kie la loĝantaro konsistas ĉefe el multaj maljunuloj, tial apartamentaro havis multajn liberajn ĉambrojn. La familio de Akira ekloĝis tie. Helpis al ĝi loĝantoj, donante fridujon, lavmaŝinon, televidilon kaj aliajn ĉiutagajn necesaĵojn. Post kelkaj tagoj, jam la familio komencis vivi relative trankvile. Ĝis tiam Akira hezitis eldiri pri mi, sed fine li diris al sia patrino:

"Panjo, legu por mi la libron 'Lokomotivo Jaemon'".

Patrino elprenis min el la kesto. Mi estis jam malnova, tenate per multaj infanaj manoj, sed tio estis des pli bona por Akira, ĉar tio rememorigis la feliĉajn tagojn en la vilaĝo litate.

Elkestiĝinte, mi sentis la aeron jam konata de mi. Tenate de la panjo, mi rigardis eksteren el la fenestro de la 4-etaĝa ĉambro. Jen arbareto. Jen parko. En la angulo de la parko vidiĝis, ja, la rubejo, kie tiu virino trovis min. Mi estis reveninta al tiu urbo, sed tio ne ĝojigis min, male kaŭzis doloron, ĉar tie mi estis traktita malafable. Mi ŝovis min, malgrandiĝinte, en la manojn de la panjo, por ke oni ne rimarku min.

Mi komencis vere sopiregi reveni al la vilaĝo litate. Tamen ĝi estas malpurigita per radioaktiveco kaj homoj ne rajtas kaj ne povas loĝi tie. Tio malĝojigis min. Por ke mi kaj la vilaĝanoj revenu al la vilaĝo, mi faros ĉion ajn, eĉ mi kunportos radioaktivajn rubaĵojn al la

profundon de la tero. Ĉiuj vilaĝanoj jam same decidis dediĉi sin al la restarigo de la vilaĝo. Se ili laboros kunlabore sub la gvido de tiu originala vilaĝestro, ili certe sukcesos. Mi firme kredas, ke la spirito de *madeivenkos* eĉ radioaktivecon. Tage mi estas en la manoj de Akira, kaj nokte mi dormas ĉe lia kapkuseno, kaj ĉiun nokton mi sonĝas, ke mi tiras vagonaron plenan de gajaj kaj feliĉmienaj vilaĝanoj al la vilaĝo litate. Mi neniam dubas, ke baldaŭ mia sonĝo fariĝos reala.

Hori Yasuo

HORI Jasuo estas japana esperantisto kaj verkisto.

Li naskiĝis en Tokio kaj kreskis en la gubernio Gunma. En 1965 li finis studadon en la universitato de Kioto kaj poste instruis la anglan lingvon en altlernejoj kaj universitatoj. Li laboris en eldonejo en Tokio.

En 1960 Hori Jasuo memlernis Esperanton. Ekde 1993 li estas estrarano de la Japana Esperanto-Instituto, respondecas pri La Revuo Orienta kaj estas de 2005 ties vicdirektoro.

Li estis prezidanto de la komisiono de UEA pri la Azia Esperanto-Movado, KAEM de 2001 ĝis 2006. Li partoprenis en dudeko da UK-oj, de Varsovio (UK 1987) ĝis Jokohamo (UK 2007) kaj plurfoje en aziaj kongresoj.

Krome li faris plurajn prelegturneojn en Francio, kien li denove vojaĝos en septembro 2011, ĉirkaŭ la temo: "Japanio post la katastrofo okazinta en marto 2011".

De la 11a de marto li regule informas la esperantistaron pri la evoluo de la situacio kaj raportas rektajn spertojn. Ĉiuj raportaj aperas sur la retejo de SAT.

100 jaroj pasis – memore al Jan Strönne, 1912-2000

En januaro 2012 estos 100 jaroj post la naskiĝo de Jan Strönne, kiu vivis 1912-2000, kaj kiu estis prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio dum 30 jaroj.

Dum lia tempo kiel esperantisto, la tuta mondo kaj la sveda esperanto-movado evoluigis kaj ŝanĝiĝis. Kiam li estis infano, la inventaĵoj de telefono, radio, aŭtomobilo, aviadilo estis tute novaj, kaj estis evento sperti la uzon de ili. Kiel junulo li vidis la monds kalan ekonomian krizon fine de la 1920-aj jaroj, mondmiliton en la 1940-aj jaroj, kaj la rapidan evoluon de komunikiloj ekde la 1950-aj jaroj. Tio estis ne nur fizikaj komunikiloj kiel aŭtomobiloj kaj flugo, sed ankaŭ telefono, televido kaj komputiloj kun interreto pli poste dum la jarcento.

En la 1930-aj jaroj li lernis esperanton, kaj samtempe konatiĝis kun Anna-Greta, kiu fariĝis lia edzino. Instruado de esperanto estis vigla en Svedio en tiu jardeko, pri kio ankaŭ Katalin Kováts skribas ĉi-jare (2010) en sia libro pri Tiberio Morariu. Kun la evoluo de internaciaj komunikiloj, la intereso pri aliaj landoj kreskis, kaj esperantistoj aranĝis rondvojaĝojn por invititaj eksterlandaj prelegantoj tra Svedio, ofte kun centoj da aŭskultantoj je prelegoj eĉ en malgrandaj urboj. La svedaj esperantistoj aranĝis universalan kongreson en Stockholm en la jaro 1934, kaj ili havis viglan interŝanĝon de turismaj vojaĝoj kun Estonio kaj je pli modesta nivelo kun Danlando. Bonaj vortaroj kaj lernolibroj aperis dum tiu jardeko.

Dum kaj post milito

Dum la militaj jaroj je la unua duono de la 1940-aj jaroj, la esperanto-agado iel funkciis en Svedio. Post la fino de la milito, la esperantistoj aktive provis informiĝi pri la sorto de siaj pli fruaj

eksterlandaj kontaktoj, kaj la internacia aktiveco rekomenciĝis. La svedo Ernfrid Malmgren fariĝis prezidanto de UEA. Kiam la postan jaron, 1948, Malmgren forlasis la prezidantecon de Sveda Esperanto-Federacio, Jan Strönne fariĝis prezidanto de SEF. En la sama jaro okazis universala kongreso en Malmö, la dua post la fino de la milito, kun Osvald Nicolaisen kiel kongresa sekretario kaj Jan Strönne kiel prezidanto de la loka kongresa komitato, post multaj solvendaj malfacilaĵoj dum la organizado pro la stato de Eŭropo post la milito.


Prelegsemajnoj

Dum la 1950-aj jaroj estis vigla agado en la sveda esperantomovado. La kluboj revigliĝis, okazis denove prelegvojaĝoj, nova lernolibro aperis, la literatura revuo "Norda Prismo" aperis. En Frostavallen, dum la 1950-aj kaj 1960-aj jaroj estis kvin- aŭ ses-foje organizitaj prelegsemajnoj, kiuj donis reehon en la tutmonda esperantomovado dum longa tempo, inter alie pro la "principaro de Frostavallen", kiun ĉefe ellaboris Ivo Lapenna. La iamaj junuloj el la komenco de la jarcento ne plu estis vere junaj, kaj en la 1950-aj jaroj fondiĝis SEJU, Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo. Ĉiujare okazis jarkongreso de SEF, organizita de iu el la lokaj kluboj.

Nomkolekto

Dum la 1960-aj jaroj, la esperanto-agado en Svedio estis simile aktiva kiel en la 1950-aj jaroj. Svedaj esperantistoj partoprenis en la nomkolekto por la peticio al UN en 1965, kaj la sveda parlamento decidis peti ke Svedio proponu ĉe UN, ke UN starigu komisionon por esplori la bezonon de internacia lingvo. La junulara SEJU montris aktivecon per aranĝo de

internaciaj junularaj kongresoj en Ystad en 1962 kaj en Tyresö en 1969, kaj SLEA aranĝis kongreson de SAT en Malmö.



Nova teknika evoluo

La 1970-aj jaroj estis ankaŭ karakterizitaj de aktiveco, inter alie pri provoj evolui la informan materialon pri esperanto. En tiu jardeko okazis la komenciĝo de la pli rapida disvastigo de komputiloj, kvankam daŭre je tekniko de paperaj tru-bendoj. Aperis lernolibro kun inspiro de komputilaj programoj, kaj la unua enskribo de nova svedesperanta vortaro komenciĝis. Preparlaboroj por aranĝo de universala kongreso en Stockholm komenciĝis, kaj ĝi okazis en la jaro 1980. Rekonon de la esperanto-aktiveco en Svedio okazis per tio ke UEA donis la unuan "Trofeo Fyne" al Sveda Esperanto-Federacio en 1978.

Kvin jardekoj da aktiveco

La jardekoj ekde komenco de 1930-aj jaroj ĝis fino de la 1970-aj jaroj estis la ĉefa periodo de aktiva agado de Jan Strönne en la sveda esperantomovado. Profesie li laboris kiel bankoficisto, kaj la esperanto-laboro estis okupo de la liberaj horoj.

En la 1930-aj jaroj, la junulo kiu ĝis tiam uzis sian duan antaŭnomon Börje kaj la

familian nomon de la patro Persson, ŝanĝis al sia unua antaŭnomo Jan kune kun alprenita nova familia nomo Strönnne. Li loĝis dum la tuta vivo en Malmö, kaj la esperantoklubo de tiu urbo rapide elektis lin prezidanto de la klubo. Kelkajn jarojn poste li eniris la estraron de la Sveda Esperanto-Federacio, kies prezidanto li fariĝis en 1948, kaj li restis prezidanto de SEF ĝis 1978, poste honora prezidanto de SEF. Dum plejparto el tiuj jaroj li ankaŭ estis komitatano de UEA, kaj delegito aŭ fakdelegito de UEA. Post 1980, li daŭre gvidis kursojn en la klubo de Malmö.

Kiel prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio dum tridek jaroj, Jan Strönnne multe influis al la esperanto-laboro. Kelkaj el la prelegvojaĝoj okazis pro lia

persona laboro. Alia rezulto de lia persona laboro estis jam frue la apero de la libro "50 jaroj kun Paul Nylén", kiu aperis komence de la 1940-aj jaroj.

Plej gravaj iniciatoj

Sed plej gravaj el la personaj iniciatoj de Jan Strönnne eble estis la kongreso en Malmö en 1948, kaj la prelegsemajnoj en Frostavallen en suda Svedio en la 1950-aj jaroj. La kongreso en Malmö montris al la esperantistoj, ke daŭre eblas prepari bonan universalan kongreson. La prelegsemajnoj kun la principaro montris, ke la esperantomovado celas esti moderna kaj profesinivela.

Ulla Luin

(filino de Anna-Greta kaj Jan Strönnne)

**ĈU ANKAŬ VI VOLAS IĜI
DELEGITO DE UEA?**

Se vi jam estas membro de UEA dum unu jaro kaj plenumas la ceterajn devojn, vi povas iĝi Delegito, Vicdelegito, Junulara Delegito aŭ Faka Delegito de ĝia Delegita Reto.

Plenigu la respondilon en la Reto Jarlibro aŭ elŝutu ĉiun ĉe www.uea.org/asisto.html, plenigu ĝin kaj sendu al via ĉefdelegito. Nur se mankas ĉefdelegito en via lando, sendu la plenigitan respondilon al la Centra Oficejo.

ALIGU AL NIA RETO!

Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo

28 juli till 4 augusti 2012

Anmälningavgifter (svenska kronor)	-2011-12-31	-2012-03-31	-2012-04-01
1. Direkt medlem i UEA(ej MG)	1460	1820	2200
2. Icke direkt medlem i UEA	1820	2280	2730
3. Medföljande, handikappad eller Ungdom(född mellan 82-01-01 och 92-12-31), som är medlem i UEA	730	910	1100
4. Medföljande, handikappad eller Ungdom, som inte är medlem i UEA	1100	1370	1640

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 91-12-31 betalar ingen Kongressavgift. Anmälningssblankett för kongressen kan beställas hos: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, 93138 Skellefteå, tel 0910-733810 eller skrivas ut på UEA hemsida <http://www.uea.org/> leif.holmlund@telia.com Eftersom kurserna är osäkra kan avgifterna komma att justeras.

Belartaj konkursoj de UEA en 2012

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 63-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 97-a Universala Kongreso en Hanojo. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en UK nek al membreco en UEA. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Validas krome la jenaj kondiĉoj:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita;

Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj);

Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita;

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo ("Esperanto – ponto al paco, amikeco kaj disvolviĝo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj); la unua premio nomiĝas "Luigi Minnaja";

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2010. Unu premio. Ĉiujn konkursaĵojn - en unu ekzemplero escepte de tiuj por la infanlibra branĉo, kiujn oni devas havigi en kvar ekzempleroj - oni devas sendi al: Belartaj Konkursoj de UEA ĉe Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio aŭ prefere rete al michela.lipari@tiscali.it,

indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas 2012-03-31. Premioj: unua premio 250 EUR, dua premio 175 EUR, tria premio 100 EUR; Nova Talento 175 EUR; Infanlibro de la Jaro 525 EUR.

Laŭ decido de la Komitato de UEA la branĉoj Kanto kaj Filmo estas suspenditaj, ĝis oni decidus pri ilia estonteco.

Detala regularo estas havebla ĉe UEA.

Bli medlem i UEA 2012

UEA är den globala organisationen för esperantister. Den har operativa relationer med UNESCO. UEA behöver ditt stöd för att uppfylla sina viktiga uppgifter att:

- * sprida esperanto och verka för en lösning på språkproblemet i internationella sammanhang
- * underlätta all sorts kommunikation mellan människor oavsett ras, religion eller politisk åsikt och därmed öka förståelsen mellan folk och länder.

UEA ger ut flera esperantotidningar bl.a. Revuo Esperanto och har en omfattande bokförsäljning. Som direktmedlem får du köpa böcker från UEA:s bokservice med 10% rabatt två gånger om året, och ifall du är MA-medlem får du rabatten vid obegränsat antal köp. UEA anordnar även varje år en stor internationell världskongress för att nämna några verksamhetsområden.

För din egen del betyder det att du får UEA:s årsbok med namn och adresser på delegater i hundratalet länder, och om du är MA-medlem, får du tidningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet (MA och MJ) dig rätt till betydligt lägre kongressavgift.

MJ-medlemmar kan läsa tidningen Esperanto på nätet och MG-medlemmar kan få en informationsbulletin på nätet, om UEA får mailadressen. Du betalar avgiften genom att sätta in pengar på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange vad pengarna avser.

Upplysningar: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå. Tel. 0910-733810, e-post leif.holmlund@telia.com

Avgifterna för år 2012 är följande:

MA Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i ungdomsorganisationen TEJO och får tidningen Kontakto. **550 kr.**

MJ Medlem med årsbok och nätversionen av tidningen Esperanto. I övrigt se ovan: **220 kr.**

MG Medlem med "Gvidlibro", och månatlig nätbulletin. Ger inte nedsatt kongressavgift: **88 kr.**

DM "Dumviva Membro" Betalar för hela livet 25 gånger avgiften för MA: **13750 kr.**

DMJ Livsmedlem med årsbok: Betalar för hela livet 25 gånger avgiften för MJ; erhåller årsboken och till fyllda 30 år medlemskap i TEJO med tidningen Kontakto. **5500 kr.**

SA Abonnemang av tidsskriften Esperanto, utan medlemskap i UEA. **350 kr.**

KTO Abonnemang av tidsskriften Kontakto, utan medlemskap i UEA. **210 kr.**

SZ Avgift för "Societo Zamenhof", en särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA: **1100 kr.**

PT "Patrono de TEJO", betalar 3 gånger avgiften för MJ för att stödja TEJO (ger inte medlemskap). Erhåller tidningen Kontakto och andra utgivningar av TEJO. **660 kr.**

LIBROJ

Pri rilatoj kaj medicino



La Edzino de kuracisto Hanaoka Seisyū. Ariyosi Sawako. Tradukis Konisi Gaku Serio Oriento-Okcidento 45. Prozo tradukita / romanoj. J.E.I. Tokio. 2008. 157 paĝoj. Prezo: 11.40 € ĉe UEA.

Laŭ japana historio la unua kuracisto, kiu faris operacion, uzante ĝeneralan anestesajon estis Hanaoka Seisyū (1760-1855) Tio okazis en 1805. En okcidenta historiografio mi trovas nomojn de usonaj kuracistoj por la sama eltrovaĵo. Kio estas la vero mi ne povas juĝi. Tute certe tamen estas ke aperis nova romano, kiu temas pri Hanaoka Seisyū, pri lia edzino kaj pri aliaj familianoj. La romano unue estas streĉa rakonto pri la rilato inter bofilino kaj bopatrino en periodo kiam la nova edzino edziniĝis pli al la nova familio ol al sia edzo. (La edzo eĉ ne ĉeestis la geedziĝon, ĉar li estis studento en fora urbo.) Due la libro estas rakonto pri kuracisto, kiu per sia tuta koro laboras por kuraci malsanojn de siaj vilaĝanoj. Precipe mama kancero estis por li granda defio.

Kaj kiel kuraci maman kanceron sen anestesaĵo? Feliĉe en Japanio ekzistis viva tradicio pri herba medicino. Tio klarigas ankaŭ la bildon sur la kovrilo de la libro. La libro apartenas al la Serio Oriento-Okcidento, kiel n-ro 45. Tio promesas kvaliton kaj pri enhavo kaj pri la traduko, kiun faris Konisi Gaku.

Legu la verkon, se vi interesiĝas pri historio japana aŭ medicina aŭ pri interhomaj rilatoj.

Leif Nordenstorm

TRA LA MONDO UEA kaj TEJO ĉe Unesko

La 36-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko estis inaŭgurita en Parizo la 25-an de oktobro kaj daŭros ĝis la 10-a de novembro. Universala Esperanto-Asocio, partoprenas ĝin kiel invitita observanto pere de siaj konstantaj reprezentantoj en Parizo, Renée Triolle, Barbara Despines kaj François Lojaco.

Kiel prezidanto de la Ĝenerala Konferenco estis elektita la hungara Unesko-ambasadorino Katalin Bogyay, konata pro sia laboro por interkultura dialogo kaj antaŭenigo de kultura diplomatio. En sia inaŭgura parolado la ĝenerala direktorino Irina Bokova elstarigis: *La defioj de paco kaj daŭripova evoluigo nuntempe situas en edukado, scienco, kulturo kaj kundivido de scioj. Ĉio ĉi postulas pli fortan rolon de Unesko.*

La 26-an kaj 27-an de oktobro kadre de la Konferenco okazis "Forumo de Gvidantoj", kun partopreno de pluraj ŝtatestroj, pri la temo *Kiel Unesko kontribuas al la konstruado de kulturo de paco kaj al daŭripova evoluigo?*

De la 17-a ĝis la 20-a de oktobro okazis la 7-a Junulara Forumo, kies temo estis *Kiel junularo kondukas ŝanĝon*. UEA ricevis inviton ĉeesti ankaŭ ĝin kiel observanto kaj delegis kiel reprezentantojn du aktivulojn de sia junulara sekcio TEJO, Veronika Poór kaj Nico Huurman. Ambaŭ partoprenis aktive en la diskutoj de la Forumo. Iliaj atentigoj pri la neceso gardi lingvan diversecon kiel esencan parton de kultura diverseco ricevis apogon de pluraj aliaj reprezentantoj.